

Esperanto-Dokumentoj, nova serio, numero 10 E (1977)

ESPERANTO

ĈU EŬROPA AŬ AZIA LINGVO ?

Claude Piron

UEA, Rotterdam, 1977

BV La Chaux-de-Fonds



1051100560

ESP-P



5851

ANTAŬPAROLO

La naciaj kaj lokaj lingvoj de la mondo estas firme ligitaj al specifaj popoloj kaj lokoj. Sed la Internacia Lingvo identiĝas kun neniu nacio aŭ geografia punkto.

Pri tiu nobla principo, kiu originis ĉe Zamenhof mem, tamen aŭdiĝas duboj de tempo al tempo inter kleruloj, precipe neparolantoj de Esperanto. Se Zamenhof konis esence nur eŭropajn lingvojn, oni demandas, kiel li povus eviti enkonstrui en sian lingvon eŭropajn gramatikajn kaj semantikajn principojn? Eĉ se sciencisto sentas sin devigata atentigi, ke ne ekzistas pure 'eŭropaj' aŭ pure 'aziaj' lingvoj — kaj eĉ se necesas emfazeke semantikaj rilatoj inter vortoj estas plejparte rezulto de la utiligo de lingvo fare de ĝiaj parolantoj, ne de apriora difinado — tamen tiu serioza demando meritas seriozan respondon.

Se efektive la lingvo de Zamenhof montriĝus firme ligita al Eŭropo, evidente ĝiaj pretendoj al neŭtraleco inter la lingvoj estus grave kompromititaj. Oni prave povus tiam aserti, ke, kvankam ĝi estas pli facila ol la aliaj lingvoj nun uzataj en la internaciaj rilatoj, kaj do serioze konsiderebla kiel internacia lingvo, ĝi tamen ne estas senpartia perilo inter la kulturoj.

Sed la scienca pruvo de tiu ĉi demando kuŝas ne en la historiaj limoj de la scio de Zamenhof, nek en la supraĵaj karakterizoj de la lingvo, sed en la efektivaj spertoj en la lernado de la lingvo en diversaj mondopartoj kaj en la profunda strukturo de Esperanto mem. Pri la unua problemo — la efektiva lerneblo de Esperanto ne nur kontraste al aliaj lingvoj sed ankaŭ en komparoj inter lernantoj el diversaj mondopartoj kaj lingvogrupoj — ekzistas ioma ĝenerala scio sed tre malmultaj sciencaj studoj. Tiaj studoj estas urĝe bezonataj.

La dua demando — ĉu efektive Esperanto estas eŭropa lingvo en iu ajn rilato krom la plej supraĵaj — estas afero, kiu jam longe interesas la sciencistojn sed nur lastatempe ricevas seriozan atenton de personoj, kiuj bone konas kaj Esperanton kaj la komparan lingvistikon. La nuna studo de unu el niaj plej kleraj lingvistoj, s-ro Piron, kiu sentas sin ĉehejme ne nur en la denaska franca lingvo sed ankaŭ ekzemple en la ĉina, estas pionira verko sur kampo apenaŭ plugata.

Ĝi ne estas, nek celas esti, polurita studo. Temas pri neformala prelego prezentita en Genevo, la 15-an de majo 1976 okaze de Kultura Semajnfino. Feliĉe ni povas aperigi ĝin en la nuna serio kiel komencan paŝon, kiu ne nur montras la vojon al konvinka pruvo pri la plena internacieco de Esperanto sed ankaŭ instigas aliajn kompetentulojn eniri tiun tiel esence gravan sciencan terenon.

Humphrey Tonkin

1. LINGVOKATEGORIOJ

Cu la esprimoj 'eŭropa lingvo', 'azia lingvo' signifas ion? Verdire ne.

En Azio oni parolas multajn lingvojn, kiuj, strukture kaj historie, apartenas al la sama familio kiel la plimulto el la eŭropaj lingvoj (la t.n. hindeŭropa familio): i.a. la iranano, la bengalan, la sinhalano. En Eŭropo, milionoj da homoj parolas lingvojn apartenantajn al kategorioj multe pli vaste reprezentataj ekstereŭrope, ekzemple la turkano, la finnano, la hungarano, la malto.

Generale, kaj tradicie, oni dividas la lingvojn en tri kategoriojn; tiel distingiĝas la lingvoj:

- a) *fleksiaj*, kiel la hindeŭropaj kaj ŝemidaj;
- b) *aglutinaj*, kiel la hungara kaj turka;
- c) *izolaj*, kiel la ĉina kaj vjetnama.

La kriterioj tradicie uzataj por klasi lingvon en unu el tiuj kategorioj estas la maniero, laŭ kiu la koncerna lingvo esprimas la gramatikajn rilatojn, kaj la procedoj, per kiuj ĝiaj vortelementoj transformiĝas aŭ grupiĝas por akiri novan signifon aŭ novan rolon en la frazo. Laŭ pli strukturisma formulo, oni povas diri, ke la kriterio estas la proporcio de *morfemoj*, kies formo povas varii.

Ni uzas ĉi tie la vorton "morfemo" ne laŭ la senco difinita en Plena Ilustrita Vortaro (PIV), sed laŭ la pli vasta internacia uzado, kiu ne konformas al la franca vortouzo preferita de PIV.

Tiusece, *morfemo* estas difinebla kiel la plej eta unuo kun lingva signifo. Ekzemple, la franca vorto *reverrai* (mi revidos) entenas tri morfemojn: *re* signas ripeton, *ver* la ideon 'vidi', kaj *rai* estas t.n. *amalgamo*, samtempe esprimanta la signifojn 'la persono(j) kiu(j) parolas', 'singularo', kaj 'futuro'. La koncepto *morfemo* do inkluzivas la lingverojn, kiujn PIV nomas 'morfemoj', kaj tiujn, kiujn ĝi nomas 'semantemoj'.

La diversaj morfemoj de lingvo evidente havas malsaman oft-econ. El la tri cititaj, *re* estas pli ofta ol *ver* (kaj ol ties aliaj formoj *vis/voi/voy/vu...*), ĉar ĝi retroviĝas en ĉiaspecaj vortoj kun tiu sama signifo 'ripeti', 'rekomenci', 'reveni', kaj *rai* estas pli ofta ol *re*: ĝi fakte povas retroviĝi ĉe ĉiuj verboj, kun la tri supremenciitaj signifoj.

La plej oftaj morfemoj estas tiuj, kiuj signas gramatikan funkcion. Ilia signifa enhavo estas tre malriĉa (se mi diras

mi os on por i e, neniu informo, praktike, transpasas al vi). Ni nomos ilin *gramatikaj morfemoj*. Oni nomas *semantemoj* (aŭ *leksemoj*) la malpli oftajn morfemojn, kies signifa enhavo estas multe pli riĉa (la frazo pren ŝpat labor ĝarden, eĉ se ne plene klara, tamen transdonas konsiderindan kvanton da informoj). Oni ĝenerale klasas inter la semantemojn la 'afiksojn', kiuj, laŭ la difino ĝenerale uzata en lingvistiko – ne valida por la morfemoj, kiujn esperantistoj nomas 'afiksoj' – utilas por derivado kaj ne povas esti uzataj solaj: re, en la franca reverrai, estas afikso: ĝi povas gluiĝi al multaj radikoj por formi derivaĵojn, sed ĉiam aperas ligita al alia semantemo.

o o o

Ni nun povas difini la tri tradiciajn lingvokategoriojn jene:

1. Se varias la formo de ĉiaspecaj morfemoj, inkluzive de semantemoj, kiuj ne estas afiksoj, la koncerna lingvo estas *fleksia*.

Ekzemple la franca: voir/vu/vision (vidi, vidita, vido)
eu/ayant/avoir (havita, havanta, havi)

2. Se varias la formo nur de gramatikaj morfemoj kaj, inter la semantemoj, nur de afiksoj, la lingvo estas *aglutina*.

Ekzemple la hungara:

j (pluralo) ak/ek/ok

domo = ház

homo = ember

tablo = asztal

domoj = házak

homoj = emberek

tabloj = asztalok

en = -ben/-ban

domo = ház

mano = kéz

en domo = házban

en mano = kézben

eco = -ság/-ség

libera = szabad

freŝa = üde

libereco = szabadság

freŝeco = üdeség

3. Se la formo de neniu morfemo varias, la lingvo estas *izola*.

Ekzemple la ĉina:

ino = nü

ŝoforo = siji

amiko = pengyou

ŝoforino = nüsiji

amikino = nüpengyou

ig(ad)o (en la senco de la angla aŭ franca -isation/
-ification) = -hua

industrio = gongye

simpla = jian dan

politiko = zhengzhi

industriigo = gongyehua

simpligo = jian dan hua

politikigo = zhengzhihua

eco = -xing

ebla = keneng
komplika = fuza
reala = shiji

ebleco = kenengxing
komplikeco = fuzaxing
realeco = shijixing

Kompari la parojn mallonga/mallongeco kaj maljusta/maljusteco estas bona maniero reliefigi la tri gradojn de variado:

mallonga/mallongeco

franca (fleksia) : bref/brièveté
hungara (aglutina): rövid/rövidség
ĉina (izola) : jianlue/jianluexing

maljusta/maljusteco

franca (fleksia) : injuste/injustice
hungara (aglutina): igazságtalan/igazságtalanság
ĉina (izola) : feizhengyi/feizhengyixing

1) fleksia lingvo: variado okazas ĉiunivele

- oni devas uzi -té en unu kazo (brièveté) kaj -ice en la alia (injustice);
- la radiko bref transformiĝas al brièv en la derivita vorto;

2) aglutina lingvo: nur la afiksoj varias

- la radikaloj rövid kaj igazságtalan ne ŝanĝiĝas;
- la sufikso estas la sama, sed ĝi prezentiĝas jen sub la formo -ség, jen sub la formo -ság;

3) izola lingvo: neniu variado okazas

- la radikaloj jianlue kaj feizhengyi ne ŝanĝiĝas;
- la sufikso -xing estas uzata ambaŭkaze kaj senŝanĝe.

o o o

Rimarkoj

1. Pro oportuneco, ni konservas la tradiciajn terminojn *fleksia*, *aglutina*, *izola*, kvankam ili estis malbone elektitaj kaj devenas de nesufiĉa analizo de la faktoj. Ekzemple, la ĉina estas ĝenerale citata kiel la tipa izola lingvo, sed ĝi fakte enhavas multegajn morfemojn, kiujn oni ne povas uzi *izole*. Tio validas ne nur pri multaj afiksoj, kiel nü- kaj -hua ĉi-supre prezentitaj, sed eĉ pri multaj aliaj semantemoj: la morfemo fu-, ekzemple, kiu signifas 'patro', neniam estas uzata sola en la ordinara lingvo (t.e. escepte de proverboj, maksimumoj, kaj poeziaj esprimoj); oni diras fuqin = 'patro'; fumu = 'gepatroj'; fuxizhidu = 'patriarkia reĝimo', ktp. Aliflanke, la ĉina konstante uzas sistemon tradicie rigardatan kiel tipe aglutinan:

ĝi aldonas morfemojn unujn al aliaj por formi kelkfoje tre longajn vortojn:

ta	= li	xin	= koro, animo, menso
tamen	= ili	xinli	= psiko
tamende	= ilia	xinlixue	= psikologio
		xinlixuejia	= psikologo
zhengyi	= justa		
feizhengyi	= maljusta		
feizhengyixing	= maljusteco		

(Ĉinaj morfemoj uziĝas solaj en la malnova skriba lingvo, la t.n. *wenyan*, sed *wenyan* neniam estis parolata lingvo kaj estus malprave konfuzi ĝin kun la lingvo, kiun oni kutime nomas "la ĉina").

2. Por klasi lingvon en unu el la tri kategorioj, ne necesas, ke la kriterio aplikiĝu 100%-e. Eta margeno antaŭvidendas, i.a. por regula variado kaŭzata de la sonsistemo. Ekzemple, en la ĉina, la sufikso -er aldonata al morfemo, kiu finiĝas per konsonanto, malaperigas ĉi-lastan, kelkfoje kun modifo de la vokala sono:

man	= malrapida	manmar	= malrapide
kuai	= rapida	kuaikuar	= rapide
ling	= kolo	lǐr	= kolumo

Sonvariado en semantemo relative oftas en la japana:

kuni	= lando	kuniguni	= ĉiuj landoj
------	---------	----------	---------------

Oni povas konsideri, ke lingvo apartenas al la koncerna kategorio, se la kriterio aplikiĝas al minimume 90% el la morfemoj aperantaj en, ni diru, dekminuta ordinara konversacio.

o o o

Ni nun povas ekzameni pli detale la tri lingvokategoriojn.

2. FLEKSIAJ LINGVOJ

En ĉi tiuj lingvoj, la radikoj transformiĝas, kiel dum derivado, tiel ankaŭ ĉe ŝanĝo de la gramatika funkcio. Kompari ilin kun Esperanto, en kiu la radiko neniam varias, evidentigas tiun apartaĵon de la fleksiaj lingvoj. Por reliefigi la neŝanĝeblon de la esperantlingvaj morfemoj, ni ĉi-sube apartigos ilin per streketo.

Jen ekzemploj el la:

<u>germana</u>	denken	pens-i
	ich dachte	mi pens-is
	Gedanke	pens-o
<u>angla</u>	sell	vend-i
	sold	vend-it-a, vend-is
	sale	vend-o
	go	ir-as, ir-u, ir-i
	went	ir-is
<u>rusa</u>	hodit'	ir-i
	ja hožu	mi ir-as
	hažival	ir-aŭ-is

Ankaŭ la ŝemidaj lingvoj estas konsiderataj fleksiaj. Sed ilia fleksieco estas iom alia: la formo de la derivitaj vortoj ŝanĝiĝas, sed baza konsonanto-framo restas senŝanĝa. En la araba, la konsonanto-framo KTB signifas skrib', verk':

KaTaBa	li skribis, li verkis
KuTiBa	estis skribite, estis verkite
jaKTuBu	li skribos, li verkos
juKTaBu	estos skribite, estos verkite
meKTuB	skribita
aKTaBa	li skribigis, li verkigis
KiTāB	verkaĵo, libro
KuTuB	verkaĵoj, libroj
KāTiB	verkisto
KaTB	verkado

3. AGLUTINAJ LINGVOJ

Aglutina lingvo karakteriziĝas per nevariebla radiko, al kiu aglutiĝas sufiksoj ne uzablaj memstare, kies vokalo povas ŝanĝiĝi laŭ la tipo de la radikaj vokaloj.

Ni prenu ekzemple la turkan esprimadon kırılmadılar mı? Ĉi dismembrigaĝas jene:

kır	romp
ıl	-ita
ma	ne
dı	-is
lar	ili
mı	ĉu

La vorto do signifas: "ĉu ili ne estis rompitaĵ?".

Jen aliaj ekzemploj, reliefigantaj la 'leĝon pri vokala harmonio': depende de tio, ĉu la radikala vokalo estas e aŭ a, la pluralo esprimiĝas per -ler aŭ per -lar, mia per -im aŭ per -ım, al (direkto, atribuo, destino) per -e aŭ -a.

ev	domo	at	ĉevalo
eve	al domo	ata	al ĉevalo
evim	mia domo	atım	mia ĉevalo
evime	al mia domo	atıma	al mia ĉevalo
evler	domoj	atlar	ĉevaloj
evlere	al domoj	atlara	al ĉevaloj
evlerim	miaj domoj	atlarım	miaj ĉevaloj
evlerime	al miaj domoj	atlarıma	al miaj ĉevaloj

Ke tiuj sufiksoj ne estas *vortoj*, kaj do tute diferencas de la esperantaj, montras du faktoj:

1) ilia vokalo ŝanĝiĝas

sevmek	ami	sevmemek	ne ami
kırmak	rompi	kırmamak	ne rompi

2) ili ne povas esti uzataj memstare

mia estas -im, -ım, -um, -m

dost	amiko	dostum	mia amiko
sofra	tablo	sofram	mia tavolo

Sed tiuj sufiksoj ne povas uziĝi aparte por signifi "mia"; se oni bezonas apartan vorton, oni devas diri benim (laŭvorte "de mi", el ben = mi). Oni ĉefe notu, ke estas nenio komuna inter la persona pronomo (ben = mi; sen = vi) kaj la sufikso, kiu tradukas tiajn posed-adjektivojn (-im = mia; -in = via).

La ĉi-supraj ekzemploj estis ĉerpitaj el la turka, sed similajn rimarkojn oni povus fari pri la hungara kaj la finna.

4. IZOLAJ LINGVOJ

La plimulto el la izolaj lingvoj estas parolataj en Azio, sed kelkaj el ili ekzistas ankaŭ en Afriko. En Ameriko, la t.n. kreolaj lingvoj same apartenas al tiu kategorio.

Oni nomis ilin izolaj, ĉar oni imagis, ke en tiuj lingvoj la vortoj konsistas el elementoj memstare -izole- uzeblaj. Fakte, tiel ne estas. Multaj ĉinaj morfemoj, kiel supre dirite, renkontiĝas nur ligitaj al aliaj. Kio efektive distingas la izolajn lingvojn estas la nevarieco de la morfemoj, kies formo restas konstanta tra ĉiuj kunmetaj, derivaj aŭ gramatikaj variaĵoj. Tialingve, kiu scias diri "mi" kaj konas la lingvajn regulojn, aŭtomate scias kiel diri "min, mia, la miaj" ktp. Ĉiuj nuancoj, precizigoj, derivaĵoj, kiujn, en alitipaj lingvoj, esprimas ŝanĝo de aŭ en morfemo, ĉi tie tradukiĝas per la vortordo, aŭ per uzo aŭ kombinado, perfekte regula, de morfemoj nepovantaj vari. Ekzistas ankaŭ diversaj procedoj, kiel *duoblado* en la malaja (puteh = blanka; puteh puteh = blankeca) kiujn plene pritrakti ĉi tie neniel utilis. La grava punkto estas ke, kiu ajn la senca aŭ gramatika ŝanĝo, la morfemo mem restas netuŝita. Gramatikan funkcion signas aŭ la loko en la frazo, aŭ nevariantaj gramatikaj morfemoj.

En la malaja kaj en la francdevena kariba kreola, la determinanta vorto staras post la determinata. "La domo de mia patrino" tradukiĝas per rumah emak saya (malaje) kaj per caïe manman moin (kreole):

rumah	emak	saya	caïe	manman	moin
dom	patrin	mi	dom	patrin	mi

En la ĉina, la ordo estas inversa:

wo	muqin	de	fangzi
mi	patrin	(-a)	dom

Wo muqin fangzi kaj wode muqinde fangzi estas gramatike korektaj, ĉar la vorto de, kiu signas determinadon, povas foresti, se la senco estas klara sen ĝi. Fakte, la esprimo wo muqinde fangzi estas preferata pro stilaĵ, ritmaj konsideroj.

En izola lingvo, al reciprokeco en la preparolataj aferoj necese respondas paralela reciprokeco en la signifantaj elementoj:

kreole:

li ka-aller caïe manman ou *ou ka-aller caïe manman li*

ĉine:

ta dao ni muqinde fangzi qu *ni dao ta muqinde fangzi qu*

Esperante:

li iras al la domo de via patrino *vi iras al la domo de lia patrino*

La kontrasto aperas, se oni komparas kun, ekzemple, hindeŭropa lingvo:

france:

il va chez votre mère *vous allez chez sa mère*

Inter *il* = *li*, kaj *sa* = *lia*, estas nenia simileco, kontraste kun la kreolaj *li/li*, la ĉinaj *ta/ta(de)*, kaj la Esperantaj *li/lia*. Same inter la francaj *va* = (*li*) *iras*, kaj *allez* = (*vi*) *iras*, kontraste kun la aliaj: *ka-aller*, *qu*, *iras*.

En la kreola kiel en la ĉina, por montri la interŝanĝon de personoj, oni interŝanĝas nur la koncernan pronomon; ĉiuj aliaj elementoj restas nevariaj. En la franca, kiel en ĉiuj fleksiaj lingvoj, tiu bela paraleleco komplete forestas. Ankaŭ en la aglutinaj lingvoj, pro la sufiksa sistemo, ne ekzistas la paraleleco (turke: *li iras* = *gidiyor*, *vi iras* = *gidiyorsunuz*, *via patrino* = *ananız*, *lia patrino* = *anası*).

Kiel la aglutinaj lingvoj, la izolaj vaste uzas kunmetadon. Tiu rimarko ĉefe validas pri la t.n. "unusilabaj lingvoj", en kiuj la plimulto el la morfemoj havas nur unu silabon, kiel la ĉina kaj la vjetnama. Tiuj lingvoj multe ekspluatas la eblecojn, kiujn prezentas metafora uzado, kiel montras jenaj ekzemploj el la ĉina:

<u>dian</u> elektro	hua	parolo	dianhua	telefono
	bao	mesaĝo	dianbao	telegramo
	li	forto	dianli	elektroforto
	per aldono de <u>xian</u> = lineo, oni ricevas:			
	dianhuaxian		telefona	lineo
	dianbaoxian		telegrafa	lineo
	dianlixian		transsenda	lineo

Tiu sistemo ĉiam ebligas solvi terminologiajn problemojn. Kiam aperis liftoj, ilia funkcio estis anstataŭi la ŝtuparojn; la

ĉinoj sekve alprenis kunmetaĵon:

dian elektro ti ŝtuparo dianti lifto

Sed kion fari, kiam jen aperas la t.n. "eskalatoroj"?

Plej simple:

zi mem, si dong mov' zidong memmoviĝanta, aŭtomata

ti ŝtuparo zidongti rulŝtuparo, eskalatoro

Estas interese konstati, ke la difino de "eskalatoro" en PIV estas:
"meĥanika ŝtuparo memmoviĝanta".

5. LA DEMANDO, KIEL KLASI ESPERANTON

Ke la tradiciaj kategorioj estas tro rigidaj, kompare kun malfacile klaseblaj realaĵoj, evidentiĝas el tio, ke difinita trajto ofte retroviĝas en malsamaj lingvo-familioj aŭ -kategorioj. Ekzemple, substantivaj kunmetaĵoj renkontiĝas tre simile en pluraj lingvoj el la tri supremenciitaj kategorioj, kiel oni vidas el la vorto "popolkomisaro":

germana (fleksia):

Volkskommissar (Volk = popolo; Kommissar = komisaro)

hungara (aglutina):

népbiztos (nép = popolo; biztos = komisaro)

ĉina (izola):

renminweiyuan (renmin = popolo; weiyuan = komisaro)

La germana strukturo ĉi-kaze pli parencas al tiu de alikategoriaj lingvoj kiel la hungara kaj ĉina, ol al lingvoj el la sama familio kiel:

la franca commissaire du peuple (laŭvorte "komisaro de la popolo").
kaj la rusa narodnyj komissar (laŭvorte "popola komisaro")

Aliaj ekzemplon prezentas la posedaj adjektivoj. Ili estas memstaraj vortoj antaŭantaj la koncernan substantivon en la plimulto el la fleksiaj lingvoj: mia patro estas france mon père; angle my father; ruse moj otec, samkiel en izolaj lingvoj kiel la ĉina: wode fuqin. Sed alia sistemo, sufiksa, unuavide tipa karakterizaĵo de la aglutinaj lingvoj:

turka baba = patro babam = mia patro

retroviĝas ankaŭ en kelkaj fleksiaj:

irana (hindeŭropa): pidar = patro pidaram = mia patro

araba (ŝemida): ab = patro abi = mia patro.

Kiel trian ekzemplon oni povas preni la neadon. La strukturo *subjekto + neada vorto + verbo* ekzistas en la tri kategorioj:

rusa (fleksia) : ja ne ponimaju

hungara (aglutina): én nem értem "mi ne komprenas"

ĉina (izola) : wo bu dong

dum samkategoriaj kaj eĉ samfamiliaj lingvoj havas malsamajn strukturojn. Al la sama grupo 'fleksia', kaj al la sama, sampraava familio 'hindeŭropa', ja apartenas:

la germana: ich verstehe nicht , laŭvorte mi komprenas ne;
 la angla : I do not understand, laŭvorte mi faras ne kompreni;
 la franca : je ne comprends pas, laŭvorte mi ne komprenas ne².

Oni vidas, ke estus neprave bazi sian argumenton sur apartaj trajtoj kiel la ĵus menciitaj, por respondi al la demando "kie situas Esperanto inter la lingvoj?". La kriterio komence difinita — t.e. la proporcio de la morfemoj povantaj varii — estas multe pli preciza kaj verŝajne pli trafa. Tamen, ĉar la adeptoj de la tradicia klasado eble ne akceptos ĝin, ni ankaŭ konsideros diversajn aliajn trajtojn, kiuj estas eble malpli signifaj, sed kiuj prezentos la avantaĝon pli bone loki Esperanton en la vasta spektro de la lingvoj de Eŭropo kaj Azio.

Ni supozu, ke jarcentojn post katastrofo ruiniginta nian civilizon, arkeologoj el nova kulturo iom post iom retrovas dokumentojn redaktitajn en la hodiaŭaj lingvoj, intertempe malaperintaj. Unu el ili malkovras esperantlingvajn tekstojn kaj sin demandas, kiel situas tiu lingvo rilate al la aliaj.

En unu el la dokumentoj, li renkontas la frazon "Li legis multajn seriozajn librojn". Li unuavide konkludas, ke temas pri tipe fleksia lingvo pro la akordiĝo gramatika de la adjektivoj kun la respondaj substantivoj (kiel en hindeŭropaj kaj ŝemidaj lingvoj). Vidante la vortprovizon, li proponas hipotezon pri la hindeŭropeco de Esperanto. Plustudante, li trovas 'konfirmojn' de tiu tezo, ekzemple en ŝajnaj vortfamilioj kiel la jenaj, kiujn li rimarkas en retrovitaj pecoj de vortaro:

direkcio	direkti	direktoro
redakcio	redakti	redaktoro

aŭ kiel:

fragmento	fragila	frakasi	frakcio	frakturo,
-----------	---------	---------	---------	-----------

kiujn vortojn videble unuigas la sama koncepto "romp". Li do konkludas, ke en Esperanto aktivas formalaj vortfamilioj similaj al tiuj de la latinidaj lingvoj: i.a. li rimarkas la alternon de du radikoj (direkc/direkt kaj frag/frak) kun sama senca valoro. Laŭ tiu arkeologo, Esperanto estas do fleksia, hindeŭropa kaj latinida lingvo.

Sed ni supozu, ke li ne limigas siajn konstatojn al tio. Daŭrigante sian esploron, li ekkomprenas, ke la hazardo komence trafis al li ne tre normalan specimenon — vortaron —, kaj ke en Esperanto ekzistas ankaŭ alispecaj vortfamilioj, fakte multege pli oftaj, kie ĉiu nova vorto estas formata per nevaria radiko kaj fiksaformaj afiksoj:

simpl-a
simpl-ig-i
simpl-ig-ebl-a
simpl-ig-ebl-ec-o.

Tiu sistemo, laŭ kiu oni regule formas novajn vortojn aldonante afiksojn al nevaria radiko, estas tradicie rigardata kiel tipa pri la aglutinaj lingvoj. Nia arkeologo konstatas, ke tiu sistemo estas multe pli produktema — t.e. konsistigas multe pli ampleksan proporcion el ordinara teksto — ol la sistemo kun alternaj radikoj kiel *frak/frag*, kiu montriĝas, verdire, tute escepta. Li konkludas, ke Esperanto apartenas al la aglutina grupo, kion perfekte konfirmas tiaj verbaj formoj kiel li resanigeblis aŭ la raporto tradukendos, senmanke eivokaj pri la turka verba sistemo.

Sed, profundiĝante en la esploro, li rimarkas ankaŭ, ke la 'afiksoj' fakte kondukas ekzakte kiel iu ajn alia semantemo, kun la sama memstareco, kio ne troviĝas en la aglutinaj lingvoj. Afiksoj ja troviĝas jen solaj (kun, kompreneble, la vokala finaĵo): aro, ebla, iĝi, eco, ktp.; jen kombinitaj: ebligi, arigi, ebleco, aĉularo...

Ĉu tiu memstareco de la morfemoj ne estas la ĉefa karakterizo tradicie atribuita al la izolaj lingvoj? Esperanto montriĝas tiurilate pli izola ol la ĉina. Kaj la afiksoj de la turka, de la hungara kaj de la aliaj aglutinaj lingvoj, siaflanke, estas veraj afiksoj, ĉiam ligitaj al aliaj semantemoj, kaj ne memstaraj vortoj, kiel la malĝuste nomitaj 'afiksoj' de Esperanto.

Pikita de scivolemo, nia arkeologo decidas serĉi, ĉu aliaj faktoj argumentas favore al struktura simileco inter Esperanto kaj la izolaj lingvoj. Kaj li rikoltas ilin abunde. Formoj kiel:

ĝis nun → ĝisnuna

mi → mia mia + land → mialanda

tuj pensigas pri la ĉina vortformado. Eĉ la fakto, ke en la sama artikolo (*Esperanto*, 69, 1976, p.61), li trovas jen estrarkunsido, jen estrara kunsido, videble kun la sama signifo estas tipa pri la ĉinlingva ebleco uzi aŭ ne uzi la determinan vorteton:

estrarkunsido = zhixingchu-hueiyi

estrara kunsido = zhixingchude hueiyi.

Ĉu do Esperanto estus izola lingvo?

6. DIVERSAJ LINGVONIVELOJ

Fakte, ne eblas klasi Esperanton sen distingi almenaŭ tri nivelojn: profundan, mezan, supraĵan.

Por difini, aĵ kiu nivelo tiu aŭ alia lingva trajto apartenas, ni uzos kiel kriterion la senton, kiun lingvouzantoj ĝenerale havas pri la graveco de la ŝanĝo aperanta, se io aliĝas rilate la konsideratan trajton.

El tiu vidpunkto, la kvalito de la sonoj estas supraĵa trajto. Neniu sentas la lingvon tre malsama depende de tio, ĉu la koncernato parolas ĝin laŭ itala aŭ dana elparolo. Ambaŭkaze, Esperanto restas Esperanto. Same, la angla restas la angla egale ĉu ĝi estas prononcata laŭ la angla, hinda aŭ usona elparolo. Anstataŭigi unu vorton per alia ne pli elvokas senton de grava ŝanĝo. Ni ne havas la senton, ke ni parolas alian lingvon, se ni transiras de la vagonaroj fariĝis pli kaj pli malnovaj al la trajnoj iĝis pli kaj pli oldaj. La donitan sennaranĝon, kiu esprimas koncepton, ni do povas rigardi trajto neesenca, supraĵa.

Kiam ni atingas la nivelon de vortordo, la impresoj, ke ni ŝanĝas la lingvon fariĝas pli akra. Se mi diras por ke homo la juna homojn la maljunajn respektu, necesas ke komprenu li ilin, mi vekas senton de strangeco. Sed tamen tiu ŝanĝo ne igas la lingvon komplete fremda. Ĝi restas Esperanto, kvankam eble poezia, aŭ regioneca. Ni atingis nivelon pli profundan ol tiu de la sonsistemo aŭ de la radikoj, sed ankoraŭ ne kernan. Iom pli profunde situas la sintakso. La frazo por ke juna homo respektas je la maljunaj, necesas ke li komprenas ilin estas malpli aŭtenta Esperanto ol la ĵus prezentita.

Kaj tamen ni ne havas la saman impreson, ke la lingvo estis atakita en sia profunda bazo, kiel se ni renkontas la frazon por ke juno homo maljunos homines respektet, necesat lim komprendero ellos. Ĉi tiu frazo ne plu estas Esperanto, eĉ malbona, kvankam preskaŭ ĉiuj radikoj estis konservitaj. Kial? Ĉar ĉifoje ni atencis la bazan nivelon, tiun de la strukturoj, de la funda konceptado gramatika. Aperas klaraj signoj de nereguleco: homo ŝanĝiĝas al homines, sed juno al maljunos, kaj forsvenis la paraleleco inter lin kaj ilin (lim, ellos); krome, la fakto, ke adjektivo (juno) havas la saman finaĵon kiel substantivo (homo) kerne detruas la lingvokonstruon elpensitan de Zamenhof.

Pruvon, ke ĉi tiu nivelo estas pli fundamenta ol tiu de la formo de la vortoj, mi ĉerpos el jena konstato. Al la meza esperantisto, la frazo "Mi rakle felbis la burnan kazumon per

mia felbilo, kaj ĝi bemis al mi" kvankam nekomprenebla — ĝi signifas nenion! — tamen estas sentata kiel Esperanto, dum la supre prezentita frazo (por ke juno homo respektet...) impresas kiel alia lingvo, eĉ al tiuj, kiuj ĝin tuj plene komprenas.

Mi sekve proponas jenan hierarkion de lingvoniveletoj:

1. *kerno* (baza, funda, profunda nivelo): baza tipo de gramatiko kaj de derivado, t.e. la maniero, laŭ kiu indikiĝas la rilatoj inter la vortoj (ekzemple, kiu determinas kiun), la precizigoj pri tiu aŭ alia nuanco (ĉu estas unu, ĉu estas pluraj; ĉu estas finite, ĉu plu daŭras; ktp.) kaj la rilatoj inter la konceptoj (ekzemple inter frato kaj fratino, inter vidi kaj nevidebla, inter haroj, stari kaj harstariga);
2. *meza nivelo*: sintakso kaj vortordo;
3. *supra* aŭ *supraĵa nivelo*: efektiva formo de la vortoj, sonsistemo.

7. KIE SITUAS ESPERANTO ?

La kerna nivelo

Funde, kerne, Esperanto estas *izola* lingvo. Ĝi perfekte konformas al la struktura kriterio pli supre difinita: nevariado de la morfemoj.

Variadoj kiel *direkc/direkt* aŭ *frag/frak* prezentas per si nur ekstreme malgrandan proporcion el tio, kio estas dirata aŭ skribata en Esperanto (inter 0,1 kaj 0,3 % el la tuto, laŭ niaj esploroj). Krome, ne temas pri sama morfemo aperanta sub diversaj formoj, kiel en la franca *directeur/diriger*. Tion pravas la fakto, ke ĉiu radiko esperanta povas naski tutan serion da novaj derivaĵoj: *direktor'* naskas *direktori, direktorigi, direktorado*, kiuĵ tute ne estas sinonimoj de *direkti, direktigi, direktado*, k.s. Temas do pri radikoj, kiuĵ videble estas etimologie parencaj, sed kiuĵ, strukture, konsistigas malsamajn morfemojn.

Tiu izola karaktero de Esperanto estas konfirmita per la granda nombro da fundamentaj trajtoj, kiuĵn ĝi posedas komune kun la ĉina:

Ĉar tiu ĉi teksto estas destinita por nefakuloj, la priskribo de la lingvaj faktoj utiligas la terminojn ĝenerale uzatajn en Okcidento. Fakte, tiuj terminoj, historie ligitaj al la hindeŭropa lingvokompreno, ne plene taŭgas por priskribi realaĵon, kiun karakterizas alitipa strukturo. La uzo de vortoj kiel "prepozicio" aŭ "adverbo" do ne signifas ke Esperanto kaj la ĉina havas prepoziciojn kaj adverbojn sam-sence kiel la okcidentaj lingvoj.

1. La 'afiksoj' fakte estas 'plenrajtaj' vortoj. Tiurilate, Esperanto estas pli izola ol la ĉina. En ĉi-lastaj lingvoj multaj afiksoj alprenas novan signifon, kiam ili estas uzataj memstare. Ekzemple, la sufikso *jia*, kiu signifas la fakulon aŭ la 'iston':

shengwuxue	biologio	shengwuxuejia	biologiisto
kexue	scienco	kexuejia	sciencisto
zhengzhi	politiko	zhengzhijia	politikisto

signifas familio, hejmo, kiam uzata sola. Multaj afiksoj tute ne povas esti uzataj memstare, kiel ekzemple la prefikso *nŭ-*, kiu signas la homajn inojn (virino estas *nŭren*, el *nŭ-* = *ino*, kaj *ren* = *hom'*), aŭ la sufikso *-hua* en *ladinghua* = latinigo, el *lading* = latina.

2. La rilato inter posed-adjektivoj kaj personaj pronomoj havas ekzaktan ekvivalenton en la ĉina: *wo* = mi, *wode* = mia, *ta* = li, *tade* = lia. Ĉi tio ne estas supraĵa detaleta aŭ okazo hazarda, sed konsekvenco de la karaktero fundamente izola de ambaŭ lingvoj. Nek la aglutinaj nek la fleksiaj lingvoj

prezentas tiun trajton, ĉar ĝi ne konformus kun ilia spirito.

3. En Esperanto kiel en la ĉina, la verbo ne havas konjugaciojn. La verbaĵaj finaĵoj de Esperanto ludas rolon analogan al tiu de la vorteroj, kiuj nuancas aŭ precizigas la senco de la ĉinaj verboj.

4. La neado esprimiĝas similstrukture en ambaŭ lingvoj:

wo bu shi = mi ne estas

jian = vid' kejian = videbla bukejian = nevidebla

5. En Esperanto, la komplementoj estas enkondukataj grandparte per prepozicioj, kontraste kun la aglutinaj lingvoj, en kiuj prepozicie funkcias sufiksoj. En la ĉina estas ĝenerale same la ekvivalentoj de al, kun, per, por, anstataŭ, ktp. uziĝas kiel en Esperanto. Tamen, por tempaj kaj lokaj komplementoj oni uzas en la ĉina postpozicion: sur la tablo estas zhuzi-shang, laŭvorte tablo-supr(e), ofte tamen krome anoncitan de prepozicio: sur la tablo = zai zhuzi-shang, laŭvorte je (ĉe) tablo-supr.

6. Kiel jam dirite, vortkunmetado okazas simile en Esperanto kaj en la ĉina, kvankam ĝi estas treege multe pli uzata en ĉinlasta. Jen ekzemploj de morfem-kunmetaj skemoj, kiuj prezentas perfektan paralelon inter la du lingvoj:

a) skemo neantaŭ---ebla / bukeyu---de

vid	neantaŭvidebla	jian	bukeyujlande
sci	neantaŭsciebla	zhi	bukeyuzhide
sent	neantaŭsentebla	gan	bukeyugande
kalkul	neantaŭkalkulebla	suan	bukeyusuande

b) skemo sam---ano / tong---ren

urb	samurbano	cheng	tongchengren
land	samlandano	guo	tongguoren
ide	samideano	dao	tongdaoren
ras	samrasano	zu	tongzuren
religi	samreligiano	jiao	tongjiaoren

Kun la fleksiaj lingvoj ne troviĝas simila paraleleco. En la plimulto el tiuj lingvoj, multaj el la koncernaj vortoj entute mankas. Tiuj, kiuj ekzistas, ne estas formitaj regule, kiel oni tuj vidos el jena ekzemplo:

	<u>samlandano/tongguoren</u>	<u>samreligiano/tongjiaoren</u>
angle	fellow-citizen	co-religionist
france	compatriote	coreligionnaire
germane	Landsmann	Glaubensgenosse
ruse	sooteĉestvennik	edinoverec

Tamen, inter Esperanto kaj la aliaj izolaj lingvoj ekzistas ankaŭ fundamenta malsamo: en Esperanto la indiko de la gramatika funkcio estas ĉiam deviga, en izolaj lingvoj neniam. Pro tiu diferenco, malgraŭ simileco struktura, la stilo, la ĝenerala fraz-disvolvo estas tre malsamaj en Esperanto kaj en la aliaj izolaj lingvoj.

En la ĉina, wo = mi women = ni
 wode = mia womende = nia

formas tabelon de derivaĵoj eĉ pli regulan ol en Esperanto. Sed la almeto de la finaĵoj -de kaj -men ne estas deviga. Mia libro povas esti tradukata per wode shu (laŭvorte mi-a libro) kaj per wo shu (laŭvorte mi- libro). Kelkfoje, kiam la kunteksto estas nepre klara, eĉ la finaĵo -men ne almetiĝas al tamen plurala pronomo: womende guo (nia lando) povas mallongiĝi al wo guo (mia lando aŭ nia lando).

Ekzemple, la komenco de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj estas en la ĉina oficiala teksto: Wo lianheguo renmin (laŭvorte "Mi UN popol"), kun la signifo "Ni, popoloj de Unuiĝintaj Nacioj".

Pro tiu ebleco ne esprimi la gramatikan rolon, la izolaj lingvoj ne devige distingas inter pasiva kaj aktiva, transitiva kaj netransitiva formoj. Ni plu ĉerpu ekzemplojn el la ĉina:

Wo hai mei he jiu
 Mi ankoraŭ ne + -is trink vin'
 "Mi ankoraŭ ne trinkis (la) vinon"

(mei estas 'amalgamo' indikante samtempe meadon kaj pasintan tempon)

Jiu hai mei he
 Vin' ankoraŭ ne + -is trink
 "La vino ankoraŭ ne estis trinkita"

Kiam temas pri vino, ne ekzistas risiko konfuziĝi, sed mult-okaze nur la kunteksto ebligas scii, kion frazo signifas. La esprimo zhe yu bu neng chi le povas signifi "tiu ĉi fiŝo ne plu povas esti manĝata", "oni ne plu povas manĝi ĉi tiun fiŝon", aŭ "tiu ĉi fiŝo ne plu povas manĝi".

Similaj dubsencecoj estas oftaj en ĉiuj lingvoj, kiuj ne klare signas la gramatikan funkcion, ekzemple en la angla, kiu ŝajnas evolui laŭ la direkto de la ĉina. Oni povas konstati, ke la nomon de organizo, kiu ludis gravan rolon en la historio de la internaciaj lingvoj, *International Auxiliary Language Association* (IALA), diversaj personoj komprenas malsame. Unuj komprenas ĝin kiel "Asocio por internacia help-lingvo", aliaj — ekzemple s-ro Ric Berger en *Historia del Lingua International* (Morges: Editiones Interlingua, 1971), p.2 — kiel "Internacia Asocio por helpa lingvo". Interese, la homoj ĝenerale ne konscias pri la malsamaj manieroj kompreni tian dusencan esprimon: la unua interpreto ŝajne havas egan forton, specon de evidenteco, kiu malhelpas konsideri la ceterajn eblecojn, kaj eĉ imagi, ke ili ekzistas.

Ĝenerale, la izolaj lingvoj aliaj ol Esperanto indikas la tempon nur, se la kunteksto ne ebligas scii, pri kiam temas. Ekzemple en la ĉina, oni distingas, en ordinara interparolo,

ta lai ma ?

li ven ĉu ?

(kiu signifas "ĉu li venas?" aŭ "ĉu li venos?") disde

ta laile ma ?

li venis ĉu ?

(kiu signifas "ĉu li venis?").

Sed se estas neniu dubo pri tio, kiam la preparolataj aferoj okazis, okazas aŭ okazos, oni preterlasas ĉian tempo-indikon:

Kong-zi shi Luguoren

Kong-mastro est Lu-landano

"Konfucio estis Lu-landano" (t.e. el la Lu-a Reĝlando).

Ni konsideru la verbojn en jena frazo:

You yige ren lai, dui ta shuo: "Fuzi, ni wulun
Hav unu hom ven, al li dir: "Mastr, vi ne-grav

wang nali qu, wo yao gencong ni".
direkte al kie ir, mi vol sekv vi".

Tiu teksto signifas: "Jen estis homo, kiu venis, kaj diris al li: 'Mastro, kien ajn vi iros, mi volas sekvi vin'". La finaĵoj -is, -as, -os, -i, de la esperanta verbo komplete forestas el la ĉina teksto.

Fakte, la devo uzi verbfiniĵojn ĉe senpersonaj formoj, en Esperanto, pensigas pri la japana, kiun oni ĝenerale klasas en la aglutinajn lingvojn.

Per kelkaj trajtoj, Esperanto similas la aglutinajn lingvojn. Ĉar la kriterio distinganta ĉi-lastajn — formŝanĝo de afiksoj aŭ de gramatikaj morfemoj — ne aplikiĝas al ĝi, ĝi ne estas fundamente aglutina lingvo. Tamen, la klareco, kun kiu la gramatika strukturo de frazo videblas, estas trajto, kiu proksimigas Esperanton al la aglutinaj lingvoj kaj malproksimigas ĝin de la izolaj.

En la japana frazo Watasi-wa isya-o denwa-de yobimas, (Mi vokas kuraciston telefone), la tuta gramatika 'skeleto' de la frazo aperas okulfrape (-wa indikas la subjekton, -o la objekton, -de la ilon, -imas verbon estantecan).

La japanan oni ĝenerale klasas inter la aglutinajn lingvojn. Kvankam la plimulto el la gramatikaj morfemoj en ĝi estas nevariaj, tamen nia kriterio aplikiĝas pro la fakto, ke ekzistas du 'konjugacioj', t.e. du kategorioj de verboj kun malsamaj finaĵoj. Cetere, en la japana ekzistas kelkaj neregulaj verboj, kvankam ne sufiĉe multnombraj por pravigi klasadon en la fleksiajn lingvojn. Kiel en Esperanto, la verbo, en la japana, havas finaĵojn, kiuj entenas en si esprimon de tempo kaj de modo, sed ne de persono. Aliflanke, la japana verbo diferencas de la esperanta per pluraj trajtoj, la ĉefa el kiuj estas la dimensio de ĝentileco (*manĝas* tradukiĝas per *taberu*, se la parolo direktiĝas al familiarulo, sed - en la ĉefpropozicio - per *tabemas* se oni parolas al nefamiliarulo). Alia diferenco estas, ke la neado estas inkluzivita en la verbaj finaĵoj: *korosita* = mortigis, *korosananda* = ne mortigis. Tria estas, ke la personan pronomon oni tre ofte subkomprenas: ekzemple, en telefona konversacio aŭdeblos la du frazoj "Doko-ni imas ka?" - "Uti-ni imas". La unua laŭvorte signifas "Kie estas?", la dua "hejme estas"; la parolantoj fidis je la situacio, je la kunteksto, por scii, ke la demando signifas "kie vi estas?" kaj la respondo "mi estas hejme".

Per pli supraj trajtoj, Esperanto estas hindeŭropa. Sed ankaŭ unu baza, kerna karakterizo estas komuna al ĝi kaj al multaj lingvoj el la hindeŭropa familio: la devo akordigi la adjektivojn kaj kelkajn pronomojn, ĉe pluralo kaj akuzativo, al la vortoj, al kiuj ili rilatas. Tamen, pro la kompleta reguleco de la sistemo, estus neprave konsideri la pluralan kaj akuzativan finaĵojn fleksiojn, kaj klasi Esperanton inter la fleksiajn lingvojn. Tiu rimarko des pli validas, ĉar la koncernaj gramatikaj morfemoj - *j, n* - nur *aldoniĝas* al la vorto, neniam anstataŭante alian finaĵon, nek kaŭzante modifon de la radiko.* Kvankam Esperanto havas multegon komunan kun la hindeŭropaj lingvoj, ĝi do estas baze, strukture, *nefleksia*.

Fakte, la apartan karakteron de Esperanto difinas la kombino de du principoj: kompleta memstareco kaj nevarieco de la vorteroj (ĉeftrajto de la izolaj lingvoj); tuj perceptebla gramatika analizo (al kiu plej proksimiĝas la aglutinaj lingvoj). En la esprimoj *mia sonĝo* / *mi sonĝas* / *miasonĝe*, la gramatika rolo de la koncepto 'sonĝ' estas eksplicite indikita, dum en la anglaj aŭ francaj frazoj, la funkcio de la vortoj *dream* kaj *rêve* estas sciebla nur el la kunteksto (*I dream/je rêve* = *mi sonĝas*; *my dream/mon rêve* = *mia sonĝo*).

Nur tre malofte esperanta frazo havas elementojn, kies rolo ne tuj analizeblas. Unu el la maloftaj strukturoj, kiuj ebligas dubsencecon estas la kunmetita vorto: *Sonĉasisto* povas signifi "ĉasisto de sonoj" kaj "ĉasisto per sonoj". Simila dubsenceco retroviĝas ankaŭ en la aglutinaj lingvoj, la plej klaraj gramatike.

* Tiurilate estas granda diferenco inter Esperanto kaj Ido. La transiro de infano al infanoj en Esperanto ne estas fleksia: temas pri *adicia* procezo: *infan + o + j*.

(Komparu kun la ĉina: *hai* = *infan*)
 (*haizi* = *infano*)
 (*haizimen* = *infanoj*).

En Ido, la pluralo formiĝas ne adicie, sed per anstataŭigo de -o per -i : *infanto* (=infano); *infanti* (=infanoj). Tio, strukture, estas tute alia afero.

La meza nivelo

Ĉe la meza nivelo, Esperanto estas nekontesteble *slava*.
Esperanto prezentas multajn slavajn karakterizaĵojn:

1. en la vortordo kaj la stilo (la kutima vortordo de esperanto)

lingva teksto tre similas al la slava):

Eo : mi lin vidis / mi vidis lin
ruse: ja ego uvidel / ja uvidel ego

Eo : kiel vi fartas? kion li legas?
ruse: kak vy poŝivaete? ĉto on ĉitaer?

(en okcidentaj lingvoj la pronomo ĝenerale staras post la verbo en tia frazo);

2. en la sintakso

a) rilatoj inter tempoj propoziciaj

Eo : mi pensis, ke pluvas
ruse: ja dumal, ĉto doŝd' idët

b) deviga refleksivo

Eo : ŝi amas sian edzon
ruse: ona lĵubit svoego muŝa

Eo : ŝi amas ŝian edzon
ruse: ona lĵubit eë muŝa

c) gramatikmorfema distingo inter epiteta kaj predikativa komplementoj

Eo : la kuracisto trovis la sanan infanon
ruse: vraĉ naŝël zdorovogo rebënka

Eo : la kuracisto trovis la infanon sana
ruse: vraĉ naŝël rebënka zdorovym

ĉ) uzo de adverba formo ĉe infinitiva aŭ propozicia subjekto

Eo : laboro estas necesa / labori estas necese
ruse: rabota nuŝna / rabotat' nuŝno

d) infinitivo kiel senprepozicia komplemento de substantivo

Eo : la deziro venki
ruse: ŝelanie pobedit'

e) malsimetrio aŭ limigoj en la uzo de prepozicio sekvata de infinitivo

- antaŭ ol foriri, sed ne post ol foriri,
anstataŭigata de foririnte aŭ post foriro

ruse: preŝde ĉem ujti, sed ne posle ĉem ujti,
anstataŭigata de uŝedŝi aŭ posle uhoda

Komparu angle: before leaving / after leaving
hispane: antes de salir / después de salir
france: avant de partir / après être parti

Ni substreku, ke la uzo de sennecesa *ol* ("antaŭ foriri" ja estus same klara) estas laŭvorta traduko el la rusa:

antaŭ *ol* foriri = ruse: *prežde ĉem* ujti

pli granda *ol* li = ruse: *bol'se ĉem* on

EO : (li rendezuis kun la spiono) por transdoni ŝtatsekretojn, sed ne (li estis arestita) pro transdoni ŝtatsekretojn

ruse: *ĉtob peredat'*, sed ne *iz-za peredat'*

Komparu angle: with a view to transmitting,
for transmitting
hispane: para transmitir, por transmitir
france: pour transmettre, pour avoir transmis

La tuta diskuto pri tio, ĉu *sen* + infinitivo estas allasebla, devenas de tiu slaveco. La fakto, ke tiu strukturo estas tre ofta en la latinidaj lingvoj (hispane: *sin olvidar*; france: *sans oublier*) kaj en la ĝermanaj (angle: *without forgetting*; germane: *ohne zu vergessen*) igis multajn rigardi ĝin taŭga. Sed, ĉar en la slavaj lingvoj ĝi ne ekzistas — oni esprimas tiun ideon per *ne* + gerundio (ruse: *ne zabyvaja* = ne forges-ante) — ĝi estis ĝenerale fremda al la lingvouzo de Zamenhof kaj sekve forĵetita de la puristoj.

3. en diversaj neokcidentaj nuanc-opozicioj (aspektoj)

konstruata domo / konstruita domo

flugis / ekflugis / flugadis

4. en multaj parolturnoj

siatempe / se konsideri / po du glasoj /
elpaŝi kun iu propono / ktp.

5. en la senco de multaj radikoj, eĉ se ĉerpitaj el latinidaj lingvoj

facila vento

okazo =

a) evento, travivaĵo (angle *event*, france *événement*)

- b) difinita aparta cirkonstanco, kazo (angle case)
(france cas)
- c) favora, helpa cirkonstanco (angle opportunity)
(france occasion)

Tiuj estas ekzakte la tri signifoj de la rusa sluĉaj.

6. en la formo de la pruntaĵoj

mateno estis prenita el la franca laŭ la slava maniero asimili:

martena forno - france: *four Martin* - en la rusa estas *martēnovskaja peĉ'* aŭ eĉ simple *martēn*; la nomo de la komponisto Chopin pole skribiĝas *Szopēn* (se la asimilado estus pure latintipa, oni havus **matino*, **Martino*).

Simile, nur slava influo klarigas, ke apud la italaj formoj studente kaj stato, kaj la germanaj Student (pron. ŝtudent) kaj Staat (pron. ŝta:t), en Esperanto oni diras studento kaj ŝtato. La Internacia Lingvo akiris tiujn formojn tra la rusa, kiu ricevis ilin de la latina, jen tra latinida lingvo (ruse student) jen tra la germana (ruse ŝtat).

7. en la skribmaniero

Ĉapelitaj konsonantoj retroviĝas en la ĉeĥa, slovaka, kroata kaj slovena;

la konstanta prononco de *c*, eĉ antaŭ *a*, *o* kaj *u* retroviĝas en meniu okcident-eŭropa Lingvo, sed en ĉiuj slavaj lingvoj skribataj latinlitere;

la tradicia maniero skribi mallongigojn en Esperanto, ofte kun streketo neniam uzata okcidente, sekvas la rusan modelon

d-ro	ruse	d-r	(doktor)
s-ino	ruse	g-ĵa	(gospoĵa)
sed	prof.	ruse	prof. (professor).

Pluraj trajtoj - sed ne ĉiuj - ĉi tie menciitaj estas komunaj al la slavaj lingvoj kaj al la klasikaj greka kaj latina.

La supraĵa nivelo

Per la origino de la radikoj, Esperanto estas ĉefe latinida kaj ĝermana, kun pli ampleksa latinida (ĉefe franca) karaktero. En la ĝermana parto, oni konstatas precipecon de la ĝermana: ekzemple, la vortkomencaj duopoj *ŝp*, *ŝt*, *ŝm* renkontiĝas nur en la ĝermana kaj jida.

Kiom koncernas la sonsistemon, Esperanto tre proksimas al la latinidaj lingvoj, ĉefe al la itala, kun tamen kelkaj orient-eŭropaj trajtoj. Slaveca estas la kompleta serio de la gingivaj konsonantoj ĉ, ŝ, ĝ, ĵ, kaj eble ankaŭ la ofteco de la grupoj *oj* kaj *aj*, kvankam ĉi tie verŝajne kuninfluas ankaŭ la jida kaj la tradicia prononco de la malnovgreka. La akcento sekvas la polan modelon.

Estus interese detale esplori, ĉu ekzistas jena leĝo:

- Ekster la kazoj, kiam aplikiĝas nur la du bazaj principoj pri nevarieco de memstaraj radikoj kaj pri tuj perceptebla gramatika analizo;
- se lingva trajto estas komuna al la lingvoj ĝermanaj kaj slavaj, ĝi retroviĝas en Esperanto;
- se lingva trajto estas komuna al la lingvoj latinidaj kaj slavaj, ankaŭ ĝi retroviĝas en Esperanto;
- se maniero solvi lingvan problemon ne estas komuna al du el tiuj grupoj (inkluzive la slavan), Esperanto sekvas

la slavan modelon, kiam temas pri mezprofunda nivelo (sintakso, stilo, parolturno),

jen la ĝermanan, jen la latinidan, se temas pri supra nivelo (fonetiko, vortformo).

Verdire, la vorto "leĝo" estas tro forta. Sendube estus pli ĝuste diri, ke, kiam la ĵus indikitaj kondiĉoj ne estas plenumitaj, aperas streĉiĝoj en la lingvo. Ni jam citis la ekzemplon pri sen + infinitivo. Oni povus trovi aliajn. La nunaj jarcento kaj jarmilo, ekzemple, sekvas la ĝermanan modelon, ne la slavan kaj latinan, sed tiujn formojn dum longa tempo konkurenca centjaro kaj miljaro.

Alia ekzemplo pri streĉiĝo estas la pasivaj participoj. Ĉu oni diru: "la kontrakto estis subskribita je la 10-a" aŭ "estis subskribata"?

La plej logika formo probable estus la germana/nederlanda: *iĝis subskribita* (je kelkaj sekundoj antaŭ la deka, la kontrakto estas subskribata, je kelkaj sekundoj post la deka ĝi certe estas subskribita, je la sekundero, kiam la lasta plumo forlasas la paperon, ĝi transiras de la stato 'subskribata' al la stato 'subskribita'; tiumomente ĝi do *iĝas* subskribita. Se oni parolas pri tio poste, oni devus logike diri: *je la deka ĝi iĝis subskribita*). Sed la lingvokutimoj de slav-, latinid-, kaj anglalingvanoj verŝajne estas tro fortaj por akcepti tian formon.

Ŝajnas, ke la *ita*-formo estas nun venkanta, kvankam nur vekinte intensan kontraŭstaron. En la uzo de la unuaj esperantistoj, kiuj plejparte loĝis en orienta Eŭropo, la *ita*-formo perfekte egalas la slavan pasintecan pasivan participon de la 'nedaŭra aspekto' (*subskribita* = ruse: *podpisannyj*) kaj la *ata*-formo la estantecan pasivan participon de la 'daŭra aspekto' (*subskribata* = ruse: *podpisyvaemyj*). Tiusisteme, finajtoj ne estas nur tempaj, ili kondensas la konceptojn pri tempo kaj pri

'aspekto': -*ata* akcentas, ke la ago disvolviĝas en daŭro, sen konsideri eventualan difinitan finpunkton, dum -*ita* substrekas, ke ĝi atingis difinitan plenumitecon.

Kio ŝajnas evidenta al slavoĵ estas nekomprenebla por ĝermano. Kiel la esperanta li iris, la germana er ging, ekzemple, tradukas egale la rusan on šël, la francan il allait, la hispanan andaba (la ago estas rigardata kiel ripetiganta aŭ daŭranta) kaj la rusan on pošël, la francan il alla, la hispanan anduvo (temas pri preciza, unufoja, difinita ago). Rezulte, la esperantistoj ĝermanlingvaj ne perceptas en la esprimo *estis subskribata* la senton pri etendiĝo en la tempo, en la daŭro, kiu en ĝi evidentas al la slavoĵ.

Koncerne la latinidlingvanoĵn, tiu nuanco estas al ili malpli fremda ol al la ĝermanoj, ĉar ĝi ekzistas en ilia konjugacio; sed en iliaj lingvoĵ ĝi neniam aplikigas al la participoj, tiel ke estas al ili malfacile simple sekvi la sistemon naturan por la slavoĵ. Konsekvence, la pasivaj participoj nun prezentas per si punkton de streĉiĝo en la lingvo, kaj la lingvouzo ne estas tre kohera (oni ofte trovas ĉe okcidentanoĵ *ita-*participon rilatan al situacioĵ, en kiuj la ago klare ripetigas).

Ni nun vidu kelkajn ekzemploĵn.

A. Ekzemploĵ pri trajtoj komunaj al la ĝermana kaj slava grupoĵ

- En la sonsistemo, uzo de *kw* kie latinidaj lingvoĵ havas *kw* aŭ *k* (tiu trajto retroviĝas ne en ĉiuj ĝermanaj lingvoĵ sed en la plimulto),
- Distingo inter *šia* kaj *lia* (kontraste kun la latinidaj lingvoĵ: franca son livre, hispana su libro, povas signifi kaj "lia" kaj "šia libro").
- Kutimo loki la epiteton antaŭ la vorton, kiun ĝi determinas. En latinida lingvo, oni ne dirus "*terura, por mi nelportebla situacio*"; la adjektivoĵ starus post la substantivo. Estas interese noti, ke en la uzado de Zamenhof la epiteta adjektivo ĝenerale sekvas la polan modelon, kaj ne la rusan; Zamenhof volonte diras *lingvo internacia* (pole: *język międzynarodowy*), dum la rusa uzo postulus *internacia lingvo* (ruse: *международный язык*).

B. Ekzemploĵ pri trajtoj komunaj al la latina kaj slava grupoĵ

- En la sonsistemo, la senvoĉaj konsonantoĵ estas senaspiraciaj: *p*, *t* kaj *k* prononciĝas kiel en la pola kaj en la itala, ne kiel en la angla, germana kaj skandinavaĵ lingvoĵ.
- La prefikso *mal-* uzata por formi kontraŭsignifajoĵn estis probable elektita prefere ol la latinaj *in-* kaj *dis-* aŭ ol la ĝermanan *un-* (*on-*), ĉar dum ĝi ebligas formi multajn derivaĵojn en la latinidaj lingvoĵ pro la signifo "malbono

Ĝi ankaŭ uziĝas prefikse en la slavaj kun la ideo "eta"
aŭ "malmulte":

france	<i>malheureux</i>	<i>malfeliĉa</i>
	<i>maladroit</i>	<i>mallerta</i>
	<i>malpropre</i>	<i>malpura</i>
	<i>malgracieux</i>	<i>malafabla</i>
ruse	<i>malen'kyj</i>	<i>malgranda</i>
	<i>malo</i>	<i>malmulte</i>
	<i>maloduŝie</i>	<i>malcuraĝo</i>
	<i>malosil'nyj</i>	<i>malforta</i>

Ni parenteze notu, ke ankaŭ la uzo de la prefikso *ne-*
estas slavdevena :

rusa	<i>nevidimyj</i>	<i>nevidebla</i>
franca	<i>invisible</i>	
germana	<i>unsichtbar</i>	

- Nea formo de la verbo: la strukturo alprenita en Esperanto
(*ne + verbo*) sekvas la modelon de ĉiuj slavaj lingvoj kaj
de ĉiuj latinidaj escepte de la franca. Ĝi retroviĝas en
neniu ĝermana.

8. KONKLUDO

La demando, kien loki Esperanton en la larĝega gamo de la homaj lingvoj, ne estas facile solvebla. Ni aliris ĝin ĉi tie nur el la vidpunkto de la profunda strukturo; ni tiel atingis la konkludon, ke Esperanto estas fundamente lingvo izola.

Se kiel kriterion ni prenis la originon de la vortoj, ni devus klasi ĝin inter la latinid/ĝermanajn, kun precipeco de la latinida fonto. Tiurilate, la du lingvoj plej proksimaj al ĝi estus la angla kaj la romanĉa.

Kriterio donanta ĉefecon al stilo kaj sintakso akcentus la slavecon de la Internacia Lingvo. Sed ni notis ankaŭ, ke Esperanto multatrajte najbaras al la aglutina grupo.

Fakte, du faktoroj igas la problemon speciale kompleksa. Unuflanke, Zamenhof probable volis krei tre koheran kodon, kaj la nevariado de la morfemoj verŝajne pli ŝuldiĝas al tiu deziro ol al la intenco sekvi kreolan aŭ ĉinan modelon. Ni tamen ne rajtas ekskludi la hipotezon, ke lin influis la konstato, ke en la tipa interkultura situacio, kiam du personoj konas nur kelkajn bazajn elementojn el komuna lingvo kaj provas komuniki, ili spontane transformas tiun malbone konatan lingvon en specon de izola lingvo.

Ĉar Zamenhof mem regis nur fleksiajn lingvojn, ties influo, eĉ se ĝi kontraŭis la bazajn principojn elektitajn por la lingva ilo, kiun li forĝis, pezis sur lia maniero skribi kaj paroli la konstruitan lingvon. La modelo proponita al la publiko ekde la unuaj paŝoj jam estis loko de internaj streĉiĝoj.

Aliflanke, la izola strukturo de Esperanto kaj ĝia ega reguleco estis akre kritikata de la kulturitaj personoj en Okcidenta Eŭropo, tiel ke Zamenhof pli kaj pli inklinis miksi kun la komenca lingvaĵo elementojn pli konformajn al la okcidentaj strukturoj, kio klarigus la ekziston de duoblaĵoj kiel *redaktisto/redaktoro*, *redaktejo/redakcio*, ktp. Tiu tendenco ŝajnas kontraŭa al liaj komencaj ideoj, se juĝi laŭ la rimarko farita en regulo 15 de la Fundamento, kie li rekomendas, koncerne la t.n. "internaciajn vortojn", deprunti nur la radikon kaj derivi la ceterajn laŭ la internaj reguloj de la lingvo.

Estu kiel ajn, alia faktoro intervenis: la "substrato". La kolektivo, kiu alprenis Esperanton, uzas, en sia granda plimulto, fleksiajn lingvojn, kaj sekve ne konas aŭ ne ŝatas la latentajn de izolaj lingvoj, kun tiu rezulto, ke ĝi emas solvi lingvajn problemojn, specife terminologiajn, laŭ principoj, kiujn oni rajtas rigardi kontraŭaj al la baza spirito de la

